

Jacques Mühlethaler, 5-a parto  
Claude Gacond, 124-a radioprelego, 1966.02.16 & 1966.02.19

Claude Gacond : Atentu esperantistoj ! Ĉi tie vi aŭdas elsendon de Svisa Kurtonda Radiostacio. Parolas Claude Gacond, Andrée Gacond kaj Cosette Giroud, kiuj daŭrigas la rakontadon pri la porpaca pilgrimado de Jacques Mühlethaler.

Andrée Gacond : Dum la pasintaj elsendoj vi konatiĝis kun tiu ĝeneva librovendisto, kiu interesigis siajn kunlaborantojn al la marŝado de sia komerco kaj decidis dediĉi sian vivon al la proklamo de la homaranaj devoj de la lernejoj. Hazarde li elektis Turkion por sia unua vojaĝo. Li petis aŭdiencon al la prezidanto de tiu respubliko.

Cosette Giroud : Alvenante en Ankara Jacques Mühlethaler iris al la svisa ambasadorejo. Tie la unua sekretario, sinjoro Gottret, informiĝis pri la motivoj de lia kampanjo. Konstatinte ilian seriozecon li telefone petis rendevuon al la Ĝenerala Sekretario de la Turka Respubliko.

Andrée : Dum la veturado al tiu altrangulo nia ĝenevano ne povis ne fari al si demandojn :

Claude : Ĉu mi kapablos kapti la intereson de tiu sekretario ? Kia homo li estos : ĉu skeptikulo, idealisto, timulo aŭ kuraĝulo ? Kiel pledadi la supernacian kaj homaranan funkcion de la lernejoj antaŭ reprezentanto de nacio ?

Cosette : Estis komika veturado en ŝanceliĝema taksio, kiu dufoje devis halti pro rad-tremado.

Andrée : Strat-oficiro subite haltigis la aŭtomobilon. En perfekta franca lingvo li salutis :

Claude : Bonan tagon, sinjoro ! Se mi ne eraras, vin atendas nia moŝto. Vi estas civitano de belega lando kaj estas nomata Jacques Mühlethaler, ĉu ? Nur daŭrigu !

Cosette : Jen ĝentilecaj vortoj, kiuj bonaŭguras. Antaŭ la palaca pordo staris same afabla funkciulo, kiu kondukis la svison antaŭ dignan altrangulon.

Andrée : - Sinjoro Mühlethaler, vi estu bonvena en tiu domo !

Claude : - Mi estas ĝoja renkonti vian moŝton !

Andrée : - Nia moŝto vin akceptos post momento. Mi estas lia privata sekretario.

Cosette : Jacques Mühlethaler sentis sin en ridinda situacio. Ĉu li povis diveni, ke li staras antaŭ la sekretario de la sekretario ? Post banala babilado la sekretario de la sekretario kondukis lin al la vera sekretario.

Andrée : Estis afabla akcepto fare de informema homo. Jacques Mühlethaler sin sentis en amika atmosfero. Post respondoj al ĝentilecaj demandoj li tuj iris al la temo motivinta la aŭdiencon.

Claude : Ĉiuj ŝtatoj sin proklamas por la paco, sed ĝis nun la lernejoj en neniu lando edukas la infanojn en atmosfero psikologie kondukanta al monda super-nacia komprenemo.

Cosette : Li komencis klarigi. Kaj li citis multajn faktojn, kiuj pruvis, ke kontraŭe la lernejoj restas plej ĝenerale edukejo al mallarĝa kaj limigita nacia glorigo. Li daŭrigis :

Claude : Paco ne konstruiĝos tute sola. Ĝin ni devas konstrui. Kaj tio ne nur buŝe dum internaciaj renkontiĝoj kaj belaj bankedaj paroladoj. Ni devas labori al ĝia konstruo en la medioj, kie konstruiĝas la opinioj de la estontaj generacioj, tio estas en la lernejoj. Ni devas serĉi la rimedojn por vekti la infanaron al pli da intergenta komprenemo. La instruado devas forigi la falsajn antaŭjuĝojn pri la ceteraj religioj, pri la ceteraj naciecoj, pri la aliaj politikaj kaj ekonomiaj sistemoj, pri la homoj apartenantaj al alia haŭtkoloro. Pro siaj falsaj ideoj la homoj estas hodiaŭ inter si surdaj al ĉia toleremo. Ili estas pretaj obei al ĉia ŝovinista provokado. Ili estas sektemuloj, kiuj vidas la bonon nur ĉe si mem. Ni ne povas ŝanĝi la pens-

Jacques Mühlethaler, 5-a parto  
Claude Gacond, 124-a radioprelego, 1966.02.16 & 1966.02.19

manieron de la plenkreskularo, kiu estas saturata de antaŭjuĝoj ricevitaĵoj dum la junaĝo far la familia kaj lerneja edukadoj. Sed kion ni povas fari, tio estas plibonigi la intelektan nutron necesa al la kresko de ilia idaro, por ke la infanoj estu edukataj en ideoj pli larĝaj, kapablaj ilin voki al nova mond-kompreno. La junularo en la tuta mondo devas ricevi cerban armaturon, kiu permesos al ĝi respekti la homon. Tiu edukado devas atentigi la junularon ne nur pri ĝiaj naciaj devoj, sed ankaŭ pri ĝiaj homaranaj devoj. Tiu edukado devas esti super-politika, super-religia kaj vere super-nacia. Oni devas sentigi al la infanoj, ke ekster la nacia grupo ekzistas aliaj samvaloraj naciaj grupoj. Pretigo al tiu laboro devus esti tuj entreprenita, kaj tio mondscale. Pro tio mi entreprenis mian mond-vojaĝon. Mi deziras kontakti la ŝtatestrojn, la eduk-ministrojn, por diskuti kun ili tiun gravan problemon.

Andrée: Tiun nekutiman prelegon aŭskultis kun granda intereso la ŝtata funkciulo. Kaj longa diskutado pruvis lian deziron helpi la dignan posteulon de Henri Dunant. La telefono funkciis por peti rendezuon al personoj, kiuj havas gravajn respondecojn edukajn. Aŭdienco kun la ŝtat-prezidanto estis promesita.

Cosette : Elirante tiun unuan aŭdiencon Jacques Mühlethaler konstatis, ke ĝi daŭris pli ol unu horo. Tiu unua kontakto kun ŝtata altrangulo ŝajnis al li pozitiva kaj kuraĝiga.

Claude : Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond, Andrée Gacond kaj Cosette Giroud diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-